

Nederlanda Katoliko

Maandblad, Officieel Orgaan van den Nederl. R.-Kath. Esperantistenbond „Nederlanda Katoliko”, gevestigd te 's Hertogenbosch, opgericht 29 Augustus 1909, bisschoppelijk en koninklijk goedgekeurd.

Ĉion per amo, nenion per forto. (*S. Franc. de Sales*).

Hoofdredacteur :
J. N. J. Smulders, Arts te Udenhout.

Abonnementsprijs,
p.jaar, franco p. post, bij vooruitbetaling
Nederland (niet-leden). . . . f 1.—
België . . . Sm. 0,87 = - 1,06
Andere landen (aliaj landoj)
Sm. 1,04 = - 1,24
Afzonderlijke nummers 10 cent.

E
S
P
E
R
A
N
T
O

Redactie en Administratie :
H. Damen, St. Crispijnstr. 57, 'sBosch.

Advertentieprijs,
per regel 10 cts.
Bij geregelde plaatsing aanzienlijke korting.
Voor inlichtingen wende men zich tot de administratie.

SALEROJ.

Kiam nova batalilo estas trovata, pli efika kaj pli taŭga ol la malnova, ne lasu ĝin eksklusive al la malamiko, kiu ajn estu la elpensinto.

Rimedo ne estas malbona, tial ke ĝi estas nova, aŭ ke la malvirtuloj la unuaj ĝin uzis. Bona estas ĉiu rimedo, kiu ne estas malinda je via stato, kaj ne kontraŭas la sanktecon de mia doktrino.

Certe, pli bone estus, se vi estus estinta la unua uzinta je mia plua gloro.

Sed, ĉar ĝi estas leĝa kaj potenca ilo, ekprenu ĝin malgraŭe. Mi ne diras: kontentiĝu je ĝi, sed: ekprenu ĝin kiel potencon armilon, ambaŭmane.

Estas tre eble, ke oni facile trouzas novajn armilojn, kaj ke oni nur malofte estas sufiĉe ekzercinta por ĉiam bone ilin uzi.

Kio rezultas el tio? ke oni devas antaŭvidi la malfacilaĵojn, singarde antaŭeniri, kaj konservi la honestecon de sia volo.

Ĉar, kvankam iom da timo kelkfoje estas prava, la moderna apostoleco tamen estas neeviteble necesa.

Se vi kondannas ĉiun novaĵon, pro la noveco, kiamaniere do vi ekkaptos la publikon?

Baldaŭ mi venos: do laboru neperdante tempon. Vi tromulte vin turmentas per la demando, ĉu la malbonuloj jam uzis, jes, eble trouzis tiun rimedon.

Sed... ĉu la pekuloj ne jam trouzis la fruktojn de la tero? Kaj tamen, kion mia amo elektis por nutrivian animon?

Ofte vi vin montras malgrandanime rilate al tre oportunaj rimedoj,

kaj, dume la malvirtuloj ilin uzas por la malbono, kaj la popoloj perdiĝas.

Se vi vere posedus la spiriton de sindonemo, vi ne kaŝus malantaŭ senvaloraj pretekstoj vian mankon je fervoro pri studo kaj agado.

Supozu, ke vi nu bone malestimis kaj kondamnis la plej celtrafajn helpilojn, kion do vi gajnis?

Hol ĉu vi tiel volus servi miajn interesojn? dum la malbonuloj nur triumfas dank' al via obstineco kaj via manko da sagaceco!

Leviĝu kaj laboru. Serĉu, studadu, sekvu, disvastigu, organizu, reformadu konstruu, kaj gajnu ĉies korojn; ĉio je mia honoro.

Sekvu la konsilojn de mia Eklezio kaj vi ne eraros.

Sekvu la gvidadon de mia Loktenanto, kaj via fervoro ne montriĝos senfrukta, nek danĝera.

El „La Katoliko de la Faro“.
de Gabrielo Palaŭ, S.J.

trad. P.A.S.

La Ĝardeneto de Jezuo.

Het Tuintje van Jesus.

Estis post la reveno el la ekzilado en Egipto, kiam la sankta Familio estis loĝanta en Nazereto. Malantaŭ la dometo etendiĝis peceto da tero, ĉirkaŭita de kreskaĵobarilo. Tie la malgranda Jezuo estis ludanta kaj petolanta en la freŝa montaero, dum lia patrino estis sidanta apud la pordo kaj ŝpinis aranee maldikajn fadenojn el la arĝente brilanta lino.

Jezuo faris el tiu loketo ĝardeneton; propramane li desegnis kvar vojetojn, kiuj partigis la lokon en kvar bedoj kaj kiuj kunigis en la centro, kie staris gracitalia palmarbo, kiu balancadis siajn foliojn tien kaj reen. Ĉirkaŭ la trunko estis rampanta la branĉoj de stranga kreskaĵo, al kiu grandaj floroj malfermiĝis. La interno de tiuj floroj el dolĉa nebrila violkoloro montris kronon ĉirkaŭitan de kvin petaloj. En la mezo leviĝis la pistilo modelita kiel lanco, kiajn la soldatoj portas, kiam ili estas irantaj militen. La kvin petaloj montris la formon de najloj kiel la lignaĵistoj estas uzantaj. Estis strangega floro; en

Het was na den terugkeer uit de ballingschap van Egypte, dat het H. huisgezin in het huisje van Nazareth woonde. Daarachter strekte zich een langwerpige vierkant plekje grond uit met een heg omgeven. Daar speelde en dartelde de kleine Jesus rond in de frissche berglucht, terwijl zijn moeder aan de achterdeur zat met haar spinnewiel en ragfijne draden spon van het zilverglanzende vlas.

Jesus had van dat plekje een tuintje gemaakt; met eigen hand had hij er vier paden in afgeteekend. Deze paden verdeelden de ruimte in vier perken, en kwamen te saam op het middelpunt, waar een slanke palmboom stond en zijn bladerentros in den wind heen en weder wiegelde. Om den stam slingerden zich de ranken van een klimplant, waaraan groote bloemen zich openen. Van zachte, mat paarsche kleur, vertoonde het inwendige van die bloem een krans, die de vijf meeldraden omringde. In het midden verhief zich de stamper, die gevormd was als een lans gelijk de krijgers die dragen wanneer zij ten strijde trekken. De meeldraden, vijf in tal, vertoonden den vorm van nagelen zooals de timmerlieden gebruiken. Het was

la tuta ĉirkaŭaĵo duo ne estis trovebla. Ofte Maria estis staranta antaŭ la kreskaĵo, kiu portis tiajn florojn kaj meditadis kion povus signifi la formo de la internaj partoj. Ĉu estis antaŭsigno de io terurega? Ĉu ĝi rilatis je la antaŭdiro de Simeono?

En la kvar bedoj Jezuo estis plantanta florojn. Jen bedo de lilioj tiel blankaj, tiel puraj ke ili lin pensigis al la virga pureco de lia sankta patrino. Ili balancadis sur siaj gracitaliaj trunketoj kaj ŝajnis ke ili mallaŭte rakontadis unu al la alia kiu estis Li, kiu ilin estis prizorganta. Kaj la belaj kalikoj tiel senmakulaj kliniĝis respektplenaj kiam la ĉarma Jezuinaneto preterpasis ilin.

La dua bedo estis plantita je miozotoj, kies dolĉaj, bluj okuletoj brilis inter la freŝa foliaro. Kaj rigardante la floretojn Jezuo pensis al la amindeco de sia patrino, li disŝiris kelkajn branĉetojn, kaj farante el ili bukedeton li alportis ĝin al Maria kiu kisis la maneton kiu estis oferanta ĝin al ŝi.

Ankoraŭ estis bedo de violetoj kiuj plenigis la tutan ĉirkaŭaĵon je dolĉega bonodoro. Sed la floretoj sin kaŝis sub la verdaj folioj, nur la bonodoro ilin perfidis.

Ĉu ili ne estis la bildo de la humilaj virtoj de Maria, kiuj balzamis la dometon de Nazareto? Kiel tiuj floretoj estis karaj al Jezuo; kiuj ĉiam memorigis lin pri la humileco de lia sankta patrino. Ofte li benis la bedon kiu disigis tian dolĉan bonodoron. Kaj la floretoj estis dankemaj pro la Dia beno, kiu igis ilin kreski kaj flori.

En la lasta bedo la malgranda Jezuo estis plantinta rozojn, je malhelruĝa koloro, kiu pensigis al

een vreemde bloem, in den geheelen omtrek was er geen tweede zóó te vinden en Maria stond dikwijls peinzend voor de plant die zulke bloesems droeg, terwijl zij zich dan afvroeg wat de vorm der inwendige deelen moest beduiden. Was het een voorteken van iets verschrikkelijks? Had het betrekking op de voorspelling van Simeon?

In de vier perken had de kleine Jesus bloemen geplant. Daar was een perk met lelien, zóó rein dat zij hem deden denken aan de maagdelijke zuiverheid zijner heilige moeder. Zij wiegden zich op hunne hooge slanke stengels en het was als vertelden zij elkander fluisterend wie het was die hen verzorgde. En de sneeuwige kelken, zoo smetteloos blank bogen zich eerbiedig als het lieve Jesuskindje langs hen kwam.

Het tweede perkje was beplant met vergeet-mij-nietjes, wier zachte blauwe oogjes zoo liefelijk schitterden tusschen het frissche groen. En Jesus dacht aan de liefalligheid zijner beminde moeder, als hij de bloempjes beschouwde; hij plukte er een ruikertje van en bracht het aan Maria die het handje kuste dat het haar aanbood.

Dan was er een perk met viooltjes die den geheelen omtrek met lieflijken geur vervulden. Wat waren die bloempjes aaminnig, hoe nederig verscholen zij zich onder de groene bladeren! Slechts hun geur verried hen!

Waren zij niet het beeld van Maria's nederige deugden die het huisje van Nazareth met zoeten geur balsemden? Hoe dierbaar waren aan Jesus die bloempjes die hem steeds de nederigheid zijner heilige moeder voor den geest brachten! Hoe dikwijls zegende hij dit perkje, dat zulk een zoeten geur deed opstijgen, en hoe dankbaar waren de bloempjes voor den Goddelijken zegen, die hen deed bloeien en groeien.

In het laatste perk had de kleine Jesus rozen geplant, het waren rozen van een diep roode kleur, die deed denken

fajro, simbolo de la amo, kiu plenigas la korojn de Jezuo kaj de Maria por la pekuloj. Iam Jezuo estos donanta la vivon kaj ĉiun sian sangon por ili. Tiu sango, ruĝa kiel la rozoj, estos gutanta malsupren kaj ornamanta la arbon de la kruco per floroj belaj je ĉiela beleco. Ofte la infaneto staris antaŭ la bedo kaj rigardis la burĝonojn sin malfermantaj en la dolĉa sunbrilo de la juna tago, kiam la rozo kovras la folietojn kvazaŭ per perletoj. Jes, tiel la ĝardeneto estis bela kiel Edeno, kiel paradizo por la Dia infano, kiu tie estis ludanta kaj petolanta sub la amplenaj okuloj de sia sankta patrino.

Ian tagon Jezueteto iris por aĉeti panon ĉe la bakisto. Maria lindonis la necesan monon kaj gajeli foriris. Estis trankvila kaj agrabla en la frua mateno. La alaŭdo estis kantanta sian kanton je ia laŭdo de Dio, levigante altege en la pura aero. La birdaro estis pepeganta inter la branĉoj de la arboj, la abeloj kisantaj la florojn kaj la insektoj zumantaj en la ora sunlumo. Ĉio en la kreitaĵo kuniĝis por laŭdi la Kreinton, kaj Jezuo la Diinfano surgenis kaj levis la manetojn al la ĉielo.

Reveninte hejmen Jezuo rimarkis sur la vojo senordan aron da knaboj, kiuj estis krientaj kaj bruantaj ĉirkaŭ maljuna virineto, kiu sidis plorante apud arbo. La larmoj tuŝis la kompateman kordon de Jezuo kaj sen timo pro la knabaĉoj li alproksimiĝis al la virino kaj demandis pro kio ŝi estis ploranta. Ŝi levis la kapon kaj tra siaj larmoj ŝi rigardis la amindan infanon kiu staris antaŭ ŝi. Ŝi ĝemis kaj ne povante paroli ŝi montris panon kiun la fiknaboj estis forprenintaj de ŝi kaj ĵetin-

aan vuur en aan bloed. Aan vuur als zinnebeeld van de liefde, die de harten van Jesus en Maria verslindt voor de zondaren, voor wie Jesus eens op het kruis het leven zou geven en al zijn bloed zou storten. Dat bloed zou nederdruppelen als rozen zoo rood en den kruisboom versieren met bloemen van hemelsche schoonheid.

Dikwijls stond het Jesuskindje voor dat perkje stil en beschouwde de knopjes als zij zich openden in het zachte zonnelicht van den jongen dag, als de dauw de blaadjes beparelde en elke drup als een diamant in den zonneglans schitterde. Ja, zóó was het goed, zóó was het tuintje een lusthof, een paradijs voor het Godskind dat daar dartelde en speelde onder het liefdevolle oog zijner heilige moeder!

Op zekeren dag ging de kleine Jesus brood halen voor het huisgezin. Maria had hem het noodige geld gegeven en vroolijk begaf hij zich op weg. Het was zoo stil, zoo heerlijk in de natuur in dit vroege morgenuur! Hoe zong de leeuwewerik al stijgend naar omhoog zijn lied uit tot lof van God! Hoe kwinkeleerde het vogelenheir tusschen de takken van de boomen, hoe zoemden de bijtjes die de bloemen kusten, hoe zwirlden de insecten die dansten in het gouden zonlicht. Alles vereenigde zich in de schepping om den Schepper te prijzen en Jesus het Goddelijk kind, boog de knietjes en hief de handjes ten hemel.

Bij het naar huis terugkeeren bemerkte Jesus ginds op den weg een ordellozen troep jongens die schreeuwden en krieschten en zich verdrongen rondom een oud vrouwtje, dat schreiend aan den weg zat. Die tranen ontroerden het medelijdend hart van den knaap en zonder vrees voor den bandellozen troep ging hij naar het vrouwtje en vroeg waarom zij weende. Zij lichtte het hoofd op en door haar tranen heen beschouwde zij het aanvallige kind dat vol mededoogen voor haar stond. Zij snikte en wees, onmachtig één woord te uiten op een brood dat de jongens haar ontnomen en

taj en ŝlimon. La pano estis tute akvumita kaj malpurigita per la koto; ĝi ne plu estis manĝebla, tamen ŝi estis tiel inalsata! Ŝi ricevis la panon de bonfarema virino, jen en la dometo kie lignaĵisto estas laboranta antaŭ la pordo.

Jezuo per kelkaj vortoj konsolis ŝin kaj kun aminda rideto li oferis al ŝi la panon, kiun li ĵus estis aĉetanta. Ŝi prenis ĝin iom timetanta: „Sed, kara infano, kion panjo diros, kiam vi revenos hejmen sen pano? Ĉu ŝi ne riproĉos kaj punos vin?“

„Ne timu, bona virineto,“ respondis la etulo, „panjo ne ĉargeniĝos.“

Ŝi ja estis doninta al vi la panon jen en la ŝlimo.

Iru trankvile hejmen kaj manĝu.“

La virino leviĝis malfacile kaj foriris post dankema rigardo alla ĉarma infaneta.

Kaj la fibuboj, kiuj forprenis la panon de la malriĉulino, kie ili estis?

Timante la sepjaran knabon, kies fortoj certe ne egalas la iliajn, ili forkuris; ne malbonaj estis ili, nur senpripensaj kaj malseriozaj. Nur unu inter ili estis malbona, li delogis ilin al malbonfarado, lian voĉon ili tro volonte aŭskultis. Kaj nun, kiam ili vidis forirante la virinon konsolitan la malbona knabo diris al siaj kunuloj:

„Venu, ni faru ŝercaĵon al tiu bubeto, venu, ni amuzos nin“.

Jezuo post la forio de la virino prenis la panon el la ŝlimo, li viŝis ĝin prudente kaj tuj la trempita krusto fariĝis bruna kaj delikata, ĝi denove aspektis tiel kvazaŭ ĝi estus ĵus elprenita al la forno kaj ĝoje la knabo kuris hejmen por alporti ĝin al sia patrino. Maria jam estis staranta antaŭ la pordo kaj

in een modderpoel hadden geworpen. Het brood was doorweekt en bezoedeld met vuil, zoo kon het tot spijs niet meer dienen en och, zij had zoo'n honger! Dat brood had zij van een liefdadige vrouw ontvangen, daar ginds in dat huisje waar die timmerman stond te werken voor de deur.

Jesus troostte haar en met liefelijken glimlach reikte hij haar het brood toe, dat hij was gaan koopen. Zij nam het aarzelend aan: Maar, lief kind, wat zal je moedertje zeggen, als je zonder brood thuis komt? Zal zij je niet beknorren of straffen?“

„Vrees niet, vrouwtje“ antwoordde de kleine. „Moeder zal niet boos zijn.“

Zij was het immers, die je het brood gaf, wat daar in de modder ligt.

Ga gerust naar huis en eet!“

Het vrouwtje stond op en strompelde huiswaarts na een dankbaren blik op het lieve kind geworpen te hebben.

En de deugnieten, die een arme het brood ontrukten, waar waren zij?

Als beangst voor den zevenjarigen knaap, wiens krachten toch niet tegen de hunne waren opgewassen, waren zij heen gevloeden. Och, zij waren niet slecht, slechts lichtzinnig en onbezonnen! Maar één onder hen was slecht; hij was het, die hen tot het kwaaddoen verleidde en naar wiens stem zij maar al te graag luisterden. En nu, nu zij van verre het vrouwtje getroost zagen huiswaarts keeren zei hij, de booze jongen, tot zijn makkers:

„Kom, wij zullen dien kleine eens een poets bakken, ga mee!“

Jesus had voorzichtig het brood uit den plas gehaald. Hij veegde het schoon en ziet, de doorweekte korst werd weer bros en bruin; het zag er weer uit, alsof het zoo juist uit den oven was gekomen. / rheugd liep de knaap naar huis om het zijne moeder te brengen. Maria stond reeds aan de voordeur en lachte haar kind vriendelijk toe. Zij had

afable ŝi ridis al sia infano. De malproksime ŝi estis vidinta kiel li kompatis la virineton kaj ŝia koro de patrino transbordiĝis je feliĉol

Jezueto nun iris al sia ĝardeneto por akvumi la kreskaĵojn, por sarki lolaĵojn, por ĝuadi la belajn florojn, kiujn lia maneto plantis kaj prizorgis. Sed ho ve! La floroj estas for!

La kreskaĵoj estas eltiritaj el la tero kaj nun kuŝas trans la vojeto. La trunketoj de la lilioj estas rompitaĵoj, la blankaj kalikoj estas malpurigitaj. La miozotoj ne plu briligas siajn afablajn bluajn okulojn, la violoj ne plu bonodoras sub la folioj, la rozoj ne plu sin balancas sur la etaj branĉoj.

Neniom plu, ĉio estas detruita, dispremigita de la fibuloj!

Jezuo haltas, larmoj brilas en liaj okuloj kaj malrapide ili glitas sur liaj rondaj vangetoj. Malgaje li rigardas la ruinigon.

Ho, ankaŭ tiele Lia koro estas tuŝita kiam Li vidas la blankan lilion de pureco detruita en la animo de siaj gekaruloj, la bluajn florojn de la virto depremitajn per la lolo de la peko, la humilajn violojn eltiritajn per la maldolĉa mano de la memestimegeco, la rozojn de la amo surmarŝitajn en la polvo de la egoismo. Ankaŭ tiam la larmoj elfluas el Liaj okuloj, ankaŭ tiam Lia koro doloriĝas.

Sed rigardul! Ne ĉio estas detruita.

Jen, el la ruiniĝitaj rozarbetoj unu branĉeto sin levas. La rozoj estas for, sed la dornoj restas.

Kaj Jezuo disŝiras la dornbranĉon kaj plektas el ĝi kronon, Liaj larmoj fluetas sur ĝin kaj la radioj de la matensuno sin reflektas en ili kaj ŝanĝas ilin en altvaloraj gemoj.

in de verte gezien, hoe hij het vrouwtje had getroost en dat had haar moederhart doen overvloeien van zaligheid. Gelukkige moeder! Heilig kindeke!

De kleine Jesus ging nu naar zijn tuintje om de planten te begieten, om het onkruid te wieden, om zich te verlustigen in den aanblik van die schoone bloemen, die zijne handje geplant en verzorgd had. Maar wat is dat? Geen bloemen zijn er meer!

De planten liggen uit den grond getrokken en over de paden verspreid! De stengels der leliën zijn geknakt, de blanke kelken vertrapt! Geen vergeet-mij nietjes laten hunne vriendelijke blauwe-oogjes meer schitteren in het donkere groen, geen viooltjes zenden hunne geuren meer op van onder de bladeren, geen rozen sieren meer de struiken!

Niets meer, alles is kaal, alles vertrapt, vernield door booze jongens!

Jesus staat stil, tranen glinsteren in zijn oogen en rollen langzaam neer over de zachtronde wangetjes. Bedroefd staart hij de verwoesting aan!

Ach! zóó wordt ook zijn hart getroffen als hij de lelieblanke bloem der onschuld ziet vernield in de ziel zijner lievelingen, als de blauwe bloesems der deugden worden verstikt door het onkruid der zonde, als de nederige viooltjes vernietigd worden door de ruwe hand van den hoogmoed, als de rozen der liefde geknakt en vertreden liggen in het stof der zelfzucht.

Dan ook vloeien tranen hem uit de oogen, dan ook weent zijn hart!

Maar zie! Niet alles is verwoest; daar, uit de vertrapte rozenstruiken schiet nog een enkele tak omhoog. De rozen welke dien tak sierden, zijn afgerukt, maar de doornen zijn gebleven. En Jesus plukt dien doornentak en buigt hem tot een kransje: daarop druppelen zijne tranen neer en de stralen der morgenzon schitteren daarin en veranderen ze in kostbare juweelen.

Ankaŭ la pasifloro estas ruinigita, sed branĉeto kun unu floro pendas malgaje duone disŝirita. Jezuo prenas kaj vindas ĝin ĉirkaŭ la dornkrono kaj subite la floro malfermiĝas. Kun malsekaj okuloj Li staris kaj rigardas ĝin; tiele Lia patrino Lin trovas.

Jezuo kuras al ŝi kaj dolĉa rideto heligas lian malgajan vizaĝon, li montras la kroneton kaj mallaŭte diras: "Rigardu, patrino, jen kion ili estas lasintaj al mi."

Christine Kamp, Amsterdam.

Ook de passiebloem is vernield, slechts een enkele rank, waaraan een knop, bleef over. Jesus strengelt die rank om het doornenkroontje en zie, de bloem opent zich. Hij staart erop neer en zóó vindt hem zijne moeder.

Jesus loopt haar tegemoet en terwijl een zoete glimlach zijn bedroefd gezichtje verheldert, toont hij haar het kransje en fluistert: „Zie, Moeder, dit hebben zij mij gelaten!”

La rubekolo.

Ĉu vi deziras, miaj geinfanoj, aŭdi legendon de birdeto? Iam ĝi estis al mi rakontata de iu maljuna gardisto, kiu rigardis la rubekolon kiel sanktan birdon.

Dum la oktobra monato, ian matenon, kune ni trairis en paco vojetojn de kaptilejo por turdoj. Venteto balancis ĉe la ekstremaĵo de maŝokaptilo el nigra harego kadavron tute rigidan de rubekolo, la flugiloj pendantaj.

Gardisto prenis la birdeton en sia dika mano, li ŝveligis sur plumojn, kortuŝata li konsideris tiun kapon rezignitan kaj klinitan.

Poste li enterigis la birdon en la ombro de acero, kaj pie, serioze li kovris tombon per musko.

Li rakontis al mi:

Legendon pri li mi scias. Iam dum la vintra sezono Jezuo aŭdis ekfrapi ĉe la fenestro de metiejo de sankta Josefo. Opiniante ke oni alvokis lin ekstere, li malfermis muntkadron. Ĉe la fenestro, sur la neĝo amasigita per la vento, birdo estis kuŝanta. . . . Rapide, la Infano prenis ĝin en siaj manoj, kuris portante ĝin al Maria kiu laboris en la kuirejo.

Li sentas malvarmon, diris la Virgulino, revarmigu lin apud la fajro,

mi tuj pretigas por li panon trempitan en lakto.

Baldaŭe la humila birdo griza rekonsciĝis.

Tute gaje vigla, li manĝis laktapanon. Flugante al dorsa parto de seĝo, li pepis koncerton al Dio. Depost tiu tago, la birdo revenis, loĝi ĉiun vintron en la nazereta domo.

Kaŝita sub la rabotaĵoj de la metiejo, li rigardis Jezumon kaj Josefon laborantaj, iafoje li sidiĝis sur la tenilo de rabotilo kaj eĉ sur la ŝultro de la Infano por kanti arion; iafoje ankaŭ li akompanis la Sanktan Virgulinon, kaj, metita sur la radŝpinilo, la akompanis la dancon de ŝpinilo per la mildeco de ĝia kanteto.

Vespere, li dormiĝis ĉe angulo de la kestego, buliĝita.

Dum somero, li venis ofte por ripozi ĉe la malfermita fenestro por saluti la Sanktan Familion. . .

Jaroj forpasis.

Ian vendredon, oni fiksas al kruco malglata la ĉarpentiston de Nazareto.

La homoj disforkuris, unuj forpelitaj pro timo, aliaj kontentaj pro ilia krimo. . .

Solaj, rompitaĵoj per doloro, apud

la pendigilo, la Virgulino, Johano kaj Maria-Magdalena ploris...

La naturo tremegis sub la ĉielo malheligita, densaj nuboj malsuprenvenis al teron... ĉar Jezuo mortanta estis.

Tiam, en la granda silento de ĉio, plilaŭtigis voĉeto plenda kiu diris:

Kial oni ne savas Jezumon? Kial ne venas helpe al li tiuj kiuj estis liaj amikoj kaj kiujn Li resanigis? Ho bona Savinto mia, se mi ne estus birdeto tute malforta, kiel mi volus vin helpi!...

Estis sur unu el la brakoj de la kruco, griza birdeto kiu ĝemis:

Ho! la malbonaj dornoj internigitaj en lia kapo, li diris, kiel ili estas suferigantaj lin... kiel ili verŝas lian sangon sur tempioj kaj frunto klinita kaj ĝis liaj ŝultroj kontuzitaj! Mi estas nur birdeto, mi ne povas eltiri tiujn najlojn, sed mi volas eltiri tiujn malbonajn dornojn kiuj fluigas lian sangon...

Kaj la birdeto flugis al kapon de Jezuo mortanta, kaj per beko li volis forpreni de la dolĉa Krucumito la dornan kronon...

Per multe da laboro, la birdo suk-

cesis rompi unu dornon ruĝan je sango.

Lacigita, li komprenis tiam ke li neniam povus detrui la tutan kronon.

Kristo kortuŝata murmuris al li:

Ho kara birdeto, ĉar ci estis dankema pro la bonfaro ricevita ĝis voli dolĉigi mian agonion, mi beligos cian rason en ĉiuj ciaz idoj.

Per sia beko levita al Jezuo, la birdeto skuis la dornon ĉe la ekstremaĵo de kiu brilis guto el dia sango.

Tiu guto el sango, senkompara rubeno, glitis al la gorgon de la birdeto...

La krucumito forte eklaŭtigis... estis la tria horo....

Dum montoj kaj ebenaĵoj ekstremis pro teruro, la rubekolo kolorita per la Krista sango, restis kaŝita, silenta, ĉe ŝulko de la mortinto..

... Estas tiamaniere ke ian aŭtunan matenon apud la tombo de flugilhavulo, en la melankolio de aĵoj, iu maljuna gardisto, miaj geinfanoj, rakontis al mi historion de birdeto.

GEORGES COME.

trad. Max Roub.

Kvar semajnojn en Esterantujo.

La libertempo ne volis alveni, kion ajn mi faris por rapidigi la tagojn! Fine, fine mi vidis la lumon de l' unua libera tago. Mi estis tiatempe jam en Esperantujo, ĉar mi estis en Roosendaal por atendi mian hungaran fraton, kiu antaŭ kvin tagoj vizitis min kaj nun revenis de sia vojaĝo al Londono. Jam frumatene mi iris al la stacidomo por renkonti lin en la vagonaro; mi tute ne diris ion pri ĉi tiu mia plano. Li preskaŭ dormis kiam mi ensaltis en la kupeon. Kio estas nun, li diris, ĉu vi estas en Roosendaal? Jes, estis

la respondo, kiel vi vidas; mi tute ne povis atendi vian alvenon en Tilburgo kaj tial mi vojaĝis al Roosendaal. Kvankam tre laca de sia vojaĝo, li tamen devis rakonti pri ĝi, ĉar li estis la gasto de esperantisto, samtempe konatulo de mi. Nun mi estis kontenta, ĉar nun komencis mia vivado en Esperantujo, la plej bela lando de l' tuta mondo! Ni rapidiĝis hejmen, por ke ni estus sufiĉe frue en la preĝejo: estis dimanĉo.

Posttagmeze ni ekskursis al Oisterwijk por renkonti amikon de mia frato.

Tiu amiko tute ne povis elpensi

kiamaniere lia hungara amiko havas fratinton en Tilburgo, ĉar li tute ne posedas fratinton! Li tute estis mirigita ke mi, nederlandano estas fratino de hungarano! Tamen tio estas la vereco diris mia frato, ĉar ŝi estas mia esperanta fratino. [Ha, li ekkriis, estas per esperanto ke vi konatiĝis kun tiu fraŭlino?

Jes, estis la respondo, kaj estas ankaŭ dank' al Esperanto ke mi vizitas vin, ĉar per Esperanto mi scias kialoke vi restadas.

La sekvintan tagon ni vizitis la tilburgan ekspozicion haltante longan tempon antaŭ nia esperanta elmontraĵo. Ĝi tre plaĉis al mia frato. Jam frue mi iris hejmen por prepari nin por la vojaĝo. La 17an de Aŭgusto oni atendis nin en Gento. Tie okazis esperanta semajno, kies fino ni ĉeestus. La tre fervora esperantisto, fraŭlino R. Schepens, kune kun nia gastomastro estis sur la perono, kondukis nin hejmen por ripozi iomete, kaj poste dum la vespero ni ĉeestis teatraĵon. Oni jam anoncis al ni, ke ni trovas alian konatulon de „Ni Tria.“ Ni prenis najn biletojn kaj eniris. Ni frapis la montritan pordon kaj nia amiko malfermante ĝin, estis tute ĝoja vidante antaŭ si du gekonatulojn.

Eniru, eniru amikoj miaj kaj rakontu kiel vi fartis post nia lasta kunesto en Budapeŝto! Vidante la tre belan ludadon de l' teatraĵo kaj babilante pri okazintaĵoj kiuj ni kune travivis, la vespero forflugis tro rapide. La venonta tago nia unua vizito estis al la akceptejo por ricevi la kongresinsignon.

Ni ĉeestis la fermkunsidon, kiu estis tre interesa. La festtagmanĝo estis tre bone vizitita kaj tre gaja. Posttagmeze ni vizitis veturilo kun granda karavano la urbon.

Vespere okazis granda balo ĉe kiu partoprenis multe da Angloj, kiuj ĵus alvenis en Gento. Mardon ni forvojaĝis kvarope al Brugge, vizitis tie la ĉefpreĝejon, la preĝejon de sankta

Nikolao kaj la kapelon de l' sankta sango. Post tagmanĝo ĉe esperantista hotelisto, ni daŭrigis nian ekskurson ĝis Ostende. Ni amuzis nin tre bone laŭlonge la maro, kie estis multe da bangastoj. Reirante Genton mi dormis en la vagono, intertempe la aliaj propagandis nian lingvon al la kunvoĝantoj kaj kun sukceso. Mercredon ni al la ekspozicio, restante tie la tutan tagon.

Priskribi ĝin estas por mi tute ne eble, ni nur trakuris la salonegojn haltante de tempo al tempo por priregardi ion tre interesan. Ni ĉiuj estis nun sufiĉe lacaj kaj ni proponis jaŭdon, matenan hejmmestadon. Je la dua posttagmeze venis la neniam laca fraŭlino R. Schepens por konduki nin al la preĝejoj de sankta Bavo, sankta Miĥaelo kaj sankta Nikolao. Poste ni pelgrimis al Oostacker, la tielnomita „malgranda Lourdes“, Revenante en la urbo ni vizitis la „Rathskeller“ rekomendita al la esperantistoj sur la programlibretoj. Post bonega dormado ni vizitis la grafan kastelon de Gento.

Ni vidis i.a. la subteran ĉambron en kiu oni ĵetis la malfeliĉulojn kiuj devis morti je malsato. La urbestro rekonstruigas la kastelon tute en ĝia antaŭa stato. De ĉi-tie ni iris denove al la ekspozicio por vidi ankoraŭ kelkajn tre interesajn partojn, kiuj ni ne vizitis la unuan fojon. Alveninte hejme, ni baliladis ankoraŭ longan tempon ĉar la venonta tago alportus lo adiaŭon. La vagonaro de la kvara kaj duono matene kunportus nin al Bern, rekte al Bern, ĉar la 24an komencus la „Naŭa Kongreso“, En Bruselo ni jam konatiĝis kun 2 samideanoj el Antverpeno, ankaŭ vojaĝante al Bern; poste en Strasburgo envenis 3 fraŭlinoj el Antverpeno kiuj jam la antaŭan tagon iris al Strasburgo. Denove en Mülhausen envenis granda grupo de fervoraj gesamideanoj kunportante standardojn.

En Bazelo la tuta perono estis plena de Esperantistoj, vojaĝante al

Berno. Ĉiuj estis gajaj kaj tre ĝojis kiam ili renkontis jam konatajn samideanojn. Feliĉe ke ni fine alvenis en Berno! Ne, ĉar la vojaĝo estis enuiga, tute ne! Kontraŭe ĝi estis tre interesa, ĉar la vagonaro kondukis nin

tra tre belaj kaj vidindaj landpartoj. Sed ni bezonis ripozon post balancado de pli ol 15 horoj, ĉu ne? Tamen mi tute ne bone dormis, eble pro troa laceco.

Daŭrigota.

F. v. Amelsfort.

La memorlibro de la Gardanta Anĝelo.

Inter ĉiuj kredoj, kies sin akompanigas nia naskiĝejo, ne estas unu pli konsola ol tiu, kiu obstinas pri ĉeestado de anĝelo komisiita de Dio por prigardi nian animon. Al ni oni lin montras vestitan per unu blanka tuniko, kiel lilioj kies lia frunto estas kronita; ĉe liaj ŝultroj, lazuraj flugiloj frostremas sub la ĉielaj ventetoj; en sia mano li tenas libron sur kiu niaj faraĵoj estas enskribitaj.

Mi memoras ke, estante infano, mi vidis ĉe la preĝa benko de mia patrino, kontraŭ ŝia ebura Kristo, albumon binditan per veluro, kaj tiel oruman, tiel belan ke, timante ĝin tuŝi, mi rigardis ĝin kun superstiĉa respekto, min demandante kiajn mirindajn vortojn ĝi povis enhavi.

Mia patrino eniris.

Mi riskis demandon pri la volumo.

Estas la memorlibro de cia gardanta anĝelo, ŝi respondis al mi, en ĝi ĉiujn faraĵojn ciajn, bonajn aŭ malbonajn li enkribis.

Ŝi diris veraĵon: patrino ĉiam estas la anĝelo de nia vivo, ŝia brako estas nia ŝirmilo kaj ŝia koro nia rifuĝejo. La mia ĉuitage skribis la familian historion, kun ĝiaj ĝojoj sennubaj, ĝiaj nedaŭraj ĉagrenoj, ĝiaj intimaj feliĉoj, kaj ofte mian nomon oni renkontis. Ĉe angulo de la strato kie ni loĝis, apud la antikva preĝejo kies la pinta turo estis dentita, vivadis sub la pluvo kaj la suno, la neĝo kaj la nebuloj, unu mizera blindulo, kies la amiko kaj la gvidanto estis hundo nomita Tido. Inteligenta, senmalica kaj servema, la bona besto insiste per sia rigardo

almozpetis al la vojirantoj kaj metis antaŭ ili lignpelveton: blindulo kaj hundo estas miaj preferatoj: al unu mi donis mian ŝparon, al alia kareson kaj mian deserton: tial el pli malproksime ke ĝi ekvidis min, Tido aŭdigis ĝojan grunton kaj ŝajnis informi sian mastron pri ĉeesto de unu amiko. Iam, pasante antaŭ miaj preferatoj, vane mi serĉis mian monujon... nenio! Kaj la malriĉa blindulo ne matenmanĝis. Mi vendus por monero miajn premiojn de l'antaŭa jaro. Mi havis inspiron, kaj prenante opalan pinglon, beletan juvelon kiun mi multe ŝatis, mi ĝin metis en la ĉapelo de la blindulo, al li dirante: „Vendu ĝin”.

Li ĝin portis ĉe mian patrinon, kiu ploris aŭdinte lin.

Vespere, mi reeniris pli ĝoja ol kutime; mia malgranda ofero farigis al mi bonŝancon; mi akiris ordensignojn, premiojn; oni bonege akceptis kaj kisis min; mia patro plenigis mian kesteton kaj nur tiam mia patrino ŝajnis ekrimarki la perdon de mia pinglo.

Mi perdis ĝin, mi ruĝigante pro honto respondis.

Estis mia unua mensogo.

Facile mi rebonigos tiun malbonŝancon, ŝi respondis al mi. Post du tagoj, enirante en mian ĉambron, mi vidis malfermitan la libron de la gardanta anĝelo, kiu tiel multe intrigis min, mi genuiĝis, mi legis la rakonton de mia almozo. Larmoj ĝojaj kaj infane fieregaj malsekigis miajn okulojn. Mia patrino alproksimiĝis

vidante mian agmanieron, mian konfuzon, ŝi komprenis kion mi sentis, kaj min premante sur sia koro, ŝi relegis kun mi la sanktan paĝon.

La anĝelo forgesis enskribi ke mi mensogis, mallaŭtege mi diris, kiam ci demandis al mi kion mi faris kun mia pinglo; mi respondis ke ĝi estis perdita.

Anĝelo tion skribis, mia filino, sed releginte tiujn liniojn kiuj al li kaŭzis neesprimeblan feliĉon, li larmis kaj liaj diaj larmoj forstrekis por ĉiam la memoron de tiu eta peko.

La jaroj forpasis kaj mi komprenis ke la gardanta anĝelo evidentigis al ni per enkoraj konsiloj, per moroj de kompatato kaj amemo, per aspiroj al la ĉielo, kien li volas nin direkti.

MARIE DAVID.

trad. Max Roub.

OFICIALA PARTO.

Ŝanĝoj en la anara listo ĝis la 15a de Oktobro 1913a.

UNUIĜOJ.

Breda.

„*Per tiu-ĉi signo ni venkos*”.

Adresŝanĝoj :

S-ro J. van Helden, Wagenberg al Breda, Chasseésingel.

F-ino M. Klümen, Catharinastraat

Bussum, „Nia Penado”.

Nova membro :

F-ino M. Winkelhagen, Gen. de la Rey-laan.

's-Gravenhage.

Adresŝanĝo :

F-ino M. F. Toonen, ĉe S-ro F. J. M. Vreeburg, Kanaal 6.

Tilburg.

Adresŝanĝoj :

S-ro F. Cools. Houtstraat 89.

S-ro A. v. Raak, Vincentiusstraat 18.

S-ro L. C. Dankers, Buitenstraat 11.

PETO !! Ni petas insiste al la Sekretarioj (inoj) de la unuiĝoj, ĉiam sendi la ŝanĝojn en la anara listo ĉiumonate antaŭ la 15-a al la ĉefsekretario de Nederlanda katoliko, S-ro H. B. van Zwet, Leeuwstraat 3bis Utrecht.

Saman peton al la favorantoj pri adresŝanĝoj.

Plendojn, pri la neregula ricevo de nia organo „Nederlanda Katoliko” al la sama adreso.

Legrondoj.

Jam estas aboneblaj :

Espero Katolika, monata revuo,
Legprezo: f 0.50 poĵare.

Esperanto, duonmonata gazeto,
Legprezo: f 0.50 poĵare.

Scienca Gazeto, monata revuo,
Legprezo f 0.74 poĵare.

Tiuj kiuj intencas partopreni al la kunlegado de unu aŭ pluraj el ĉi-tiuj periodikoj, bonvolu sciigi siajn adresojn al la administranto de la legrondoj, *kune sendante la legmonon poŝtmandate*. Kiu deziras legi alian periodikon aŭ ian libron, sciigu tion al la sama adreso. Post aprobo de la Religia Konsilanto mi metos ĝin ankaŭ sur la liston de la aboneblaj verkoj. Samideanoj! Nun malpravigu la dirajon ke Esperantistoj tro malmulte legas.

La administranto de la Legrondoj,

P. A. SCHENDELER.

Maria-Heide, Veghel.

ENLANDA KRONIKO.

Kuiklando. Oeffelt grandece festis la jarcentan sendependecon de l'patrujo je la 21 Okt. 1913. Inter aliaj grupoj ni admiris tiun de la pacanĝelo, riprezentita de 12-jara Esperantistino. Sur veturilo belege ornamita de floroj kaj verdaj girlandoj la anĝelo suprentenis en la maldekstra mano ŝildon kun *Esperanta* surskribo, ĉirkaŭita de palmbranĉetoj: *paco sur tero*; dekstre ŝi mantuŝis terglobon, sur kiu turnis verdstelita ventmontrilo, vidigante en oraj literoj: *Esperanto*.

Inte la lernejinferoj ni vidis ankorau sep geesperantistetojn, portantaj flagetojn verdkoloritajn, sur kiuj ni legis: *Nederlanda Katoliko — Ni celas pacon — Ni helpas papon — Ni volas Dion*, k.t.p. Belega reklamo por nia movado!

*Patro F. Severijns O. S. C.
St. Agatha.*

Tilburgo. La ĉi-tiea sekcio de „N. K.“ kiu aranĝis dum la okazinta internacia ekspozicio la Esperantan fakon deziras eldiri publikan dankon al la firmo Govers el Hago, kiu sendis tute senprofite plejgrandan parton de la ekspoziciaĵoj.

Nova Sekcio de N.K.

Roermond. Merkredon, 22an de Oktobro estas fondita grupo Esperantista en Roermond.

Koran bonvenon al la aniĝintoj kiuj tuj decidis aliĝi al „N. K.“ La starigon ni ŝaldas al niaj fervoraj propagandistoj, la elokventaj oratoroj pastroj Poell kaj Linnebank. Post iliaj paroladoj la nova grupo starigis kun 55 membroj. Ni esperas ke la Esperantistoj de Roermond fervore kaj sukcesplene laboros por la bono de nia komuna afero. H. D.

Utrecht. Laŭ iniciato de l'ĉefestraro de la R. K. Laborista Unuiĝo „St. Joseph“ en Oktobro komencis Esperanto kursaro por la membroj de suprenomita unuiĝo. Antaŭe en aparta kunveno S-ro van Zwet donis mallongan resumon de la Esperanta gramatiko.

Esperanto Moerkerk Zegels.

De Bossche club verblijdt zich in het voortdurend succes dezer zegels, die inderdaad overal gewild blijken te zijn. Er is dan ook nog zelden in binnen of buitenland een propagandazegel voor onze zaak verschenen, dat in kunstwaarde het „Moerkerkzegel“ evenaart. Dat de prijs van dit propagandamiddel zoo onevenredig laag is, danken wij vooral aan de belangeloosheid van den kunstenaar - ontwerper, terwijl voorts de enorm groote oplage dit mogelijk maakte.

Welke samideano gebruikt nu dit propagandazegel nog niet?

H. D.

De Derde Gewestelijke Esperantodag in Oisterwijk,

Op Zondag 26 October vergaderde te Tilburg het comité voor de gewestelijke Esperanto-dagen. Door eenige comitéleden werd de wenselijkheid uitgesproken een secretaris te benoemen, welk voorstel algemeene instemming vond. Tot secretaris werd alsdan gekozen de heer J. G. Coenen uit Uden, die de benoeming aannam.

Daarna kwamen aan de orde de besprekingen, betreffende den volgenden Esperanto-dag in dit gewest. Verschillende plaatsen werden voorgesteld en besproken, doch ten slotte werd met algemeene stemmen besloten onze derde streekvergadering te doen plaats hebben in Oisterwijk. Alhoewel in die plaats nog geene afdeeling van „N. K.” bestaat, heeft de commissie de wetenschap, dat de voorbereidingen ter plaatse naar behooren zullen geschieden.

Wij meenen, dat met dit besluit het comité een daad verricht heeft, die voor de propaganda van de Esperantobeweging van groot gewicht is, een daad ook, waarmede zij de Esperantisten in hooge mate aan zich zal verplichten.

De Derde Esperanto-dag in een der schoonste en bezienswaardigste plaatsen van ons Zuiden, in Oisterwijk, dat van af de vroege lente tot in den herfst bezocht wordt door duizenden en duizenden die er in de prachtige en uitgestrekte bosschen komen verpoezen om de vaak bedompte stadslucht te verwisselen met de zuivere boschlucht, daar, in het land der schilderachtige plassen en vennen, daar zal die dag zonder eenigen twijfel zijn beide voorgangers in belangrijkheid nog overtreffen.

H. D.

Esperanto kaj la fervojistoj.

„Dimanĉon la 26an de Oktobro en Rotterdam ĉe hotelo Coomans okazis la stariga kunveno de: „Ligo de Nederlandaj Fervojistoj-Esperantistoj. Ĉeestis proksimume 40 personoj, inter kiuj S-ro Vermaas, Distrikta Delegito de U.E.A. kaj kelkaj amikaj malmultaj samideanoj ne-fervojistoj. Al la nova ligo jam aliĝis

proksimume 40 membroj. Ĝia celo estas progresigi la esp. movadon inter la fervojistoj, ĉar ĉi-tiu kategorio pli kaj pli konvinkiĝas ke Esperanto estas ankaŭ al ili la nura, efika solvo de la lingva problemo, tiom grava al ili pro ilia konstanta ektuŝado kun fremdnaciaj vojaĝantoj.

S-ro Vermaas esperantlingve parolis pri „la celo de U.E.A.” Post ĉi-tiu tre interesa kaj klariga parolado ekstariĝis vigla diskuto pri la ebleco kiamaniere la ligo povus aliĝi al citita asocio, kies servojn la ligo celas uzi, rilate la favoran kondiĉon de siaj membroj: senpagan vojaĝadon ankaŭ eksterlandan.

Rezulto de la interparolado estis:

Starigo de la ligo, kun suprecitita celo.

La membroj, kiuj volas partopreni ekskurson aranĝitan de la Ligo devos antaŭe aliĝi al U.E.A. kiel membroj. La ligo ne havos reĝinan aprobon, nek eldonos organon; pro tio ne havos gravajn elspezojn, la membroj do ne bezonos pagi krom 25 cendoj aliĝante al la ligo, kotizaĵon. Koncerne tion la provizora prezidanto montris ke por fariĝi, praktika esperantisto oni ne kontentiĝu je membriĝo de la ligo, sed aniĝu al unu aŭ pli da ceteraj esp. societoj naciaj kaj internaciaj. Sperante la grandan utilecon de Esperanto entreprenante eksterlandajn ekskursojn, ĉi-tio sendube okazos.

Kiel prezidanton estis elektata S-ro H. Dijkstra, stacio-asistanto en Feijenoord, Sekretario S-ro J. Bal fervoja komizo en Breda, Nassausingal 18.

H.H.

Eksterlanda Kroniko.

Nekrologioj.

R. de Ladevèze.

La 14-an de julio mortis en *Marseille*, post longa kaj suferiga malsano

S-ro. R. de Ladevèze, je la 28-a jaro de sia vivo.

S-ro de Ladevèze estis elektata ano de la Lingva Komitato la 1-an de julio 1909. En tiu epoko, li loĝis en *Hamburg*, kie li vigle kaj sindoneme propagandis nian lingvon, kiun li perfekte konis kaj lertege parolis. En Aŭgusto 1911, pro manko da tempo kaj troa okupateco, li ekŝiĝis el la Komitato.

Li verkis *Demandaro pri la Historio, Literaturo kaj Organizaĵoj de Esperanto* (Dresden, 1911), kiun uzas kun profito la kandidatoj al esperantistaj diplomoj.

Carlo Bourlet.

Kun profunda doloro, ni sciigas pri la morto de S-ro Carlo Bourlet, okazinta la 12-an de Aŭgusto en *Annecy*, sekve de malfeliĉa akcidento.

Oni apenaŭ bezonas memorigi, ke S-ro Bourlet okupis, inter la Esperantistaro, unu el la ĉefaj lokoj, per la multaj kaj gravaj oficoj, kiujn li plenumadis. Li estis vic-prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, membro de la Lingva Komitato, direktoro de la *Revue*, prezidanto de la Grupo Esperantista de *Paris*. Lia morto estas unu el la plej gravaj perdoj, kiujn povus suferi la Esperantista movado.

S-ro Carlo Bourlet naskiĝis en *Strassburg*, la 25-an de Aprilo 1866, faris siajn klasikajn studadojn en sia naskurbo, kaj poste en *Bourges* kaj *Paris* (liceo *Saint-Louis*). Li estis poste akceptita kun la numero 1 en en la *École Polytechnique*, kaj kun la numero 2 en la *École Normale supérieure*. Li elektis tiun lastan (1885).

Akirinte kun la numero 1 la diplomojn de „licenciato por matematikaj kaj fizikaj sciencoj“ (1887) kaj „agregaciulo de matematikoj“ (1888),

li obtenis, tri jarojn poste, la titolon de doktoro de sciencoj.

La instruis en la *École normale supérieure* (1888) en liceo *Lakanal* en liceo *Henri VI* (1892), en liceo *Saint-Louis* (1897), en la Sorbonne (1899). Li faris, de post 1896, la kurson de grafika statiko kaj rezisteco de materialoj en la Nacia Lernejo de Belartoj, kaj estis de post 1906 profesoro de mekaniko en la Konservatorio de Artoj kaj Metioj.

Fama kaj klera matematikisto, S-ro Carlo Bourlet ĉiam laboris por pliproksimigi kun la praktika vivo la pursciencon kaj la sciencajn instruadon, por tiamaniere igi la sciencajn studadojn vere utilaj.

Krom kompletaj kursoj de Aritmetiko, Algebro kaj Geometrio, uzataj en preskaŭ ĉiuj kolegioj kaj liceoj de Francujo (kaj kies hispanaj tradukoj komencas disvastiĝi en Hispanujo kaj Sud-Ameriko), S-ro Bourlet verkis pli ol dudek verkoj de puraj aŭ aplikataj matematikoj, kaj kunlaboris en multaj sciencaj gazetoj. Li estis membro de la Ekzamenistaro por agregacio de Matematikaj Sciencoj, kaj estis membro de la Naŭa Komisiono pri Metrologio.

Varbita al la lingvo Esperanto en la jaro 1900, de Profesoro Charles Méray, S-ro Carlo Bourlet estis unu el la ĉefaj protagonistoj, el la plej agemaj propagandistoj kaj energiaj defendantoj de nia lingvo. De la jaro 1901, li estis elektita prezidanto de la Esperantista Grupo de Paris, kaj de tiu tempo ĉiam reelektita. Li fondigis en tuta Francujo, multajn grupojn, per propagandaj paroladoj, kaj gazetaj artikoloj. Li sukcesis interesi al Esperanto la gravan francan societon Touring-Club kaj la plej gravan eldonejon de Francujo, kiu publikigis propagandan gramatikejon, verkitan de li, kaj populare konatan sub nomo „ruĝa broŝuro“, el kiu ĝis nun, pli ol 500000 ekzempleroj estas disdonitaj.

Li fondis la Revuon, kaj ĝin direktis, helpis la fondon de la Scienca Revuo, kaj poste de la Scienca Gazeto, kaj estis sekretario de la Internacia Scienca Asocio Esperantista. En la Revuo kaj aliaj esperantistaj gazetoj li publikigis multajn propagandajn artikolojn, tradukojn kaj originalaĵojn.

Li ĉeestis ĉiujn Universalajn Kongresojn krom tiu de Washington, estis elektita vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj kaj de la Administra Komitato de la Centra Oficejo kaj iniciatis la ideon de la deka Kongreso Universala en en Paris, por kies sukceso li jam estis tre ageme laborinta.

En la memoro de la Esperantistoj vivos eterne la nomo de S-ro Carlo Bourlet, kiu dum dek-tri jaroj, dediĉis al nia movado, plej grandan parton el sia granda laboremo kaj altaj kapabloj.

O.G.

BIBLIOGRAFIO.

Superforta Ambicio, skizo el la Esperantista vivo, originale verkita de A. A. Saĥarov. Prezo Sm. 0.22. Eldono de Librejo „Esperanto“, 3 Lubjanskij proezd Moskvo, Ruslando. Rakonto pri fervorega Esperantisto,

kies edzino fariĝas ĵaluza je Esperanto, pri kiu fine la edzo sole sin okupas.

Evidente la skizo celas deteni niajn samideanojn de tiaj ekstremaĵoj, kiaj estas rakontataj en la verketo.

Pri la stilo mi devas diri ke la frazkonstruo ne ĉie plaĉis min. Ankaŭ la verkisto uzas la pronomon „sia“ anstataŭ „mia“ (paĝo 9) kaj delatas kelkafoje la pronomon „ĝi“. Ĉu estas kulpa la Rusa lingvo kiu uzas i.a. la reflektivon pronomon ankaŭ ĉe la unua persono?

Derde Esperanto Katologus. (October 1913). Uitgave Algemeene boekhandel „Espero“, Prinsestraat 48, den Haag. Gratis op aanvraag.

Zeer uitgebreide catalogus van velerlei Esperanto-uitgaven met aangifte van den prijs in Nederlandsche munt, bij franco toezending.

Deze catalogus bevat o.a. een lijst van Leerboeken. Leesboeken en Leesboekjes, Boeken over de Esperantobeweging met hare geschiedenis en taal, propagandageschriften en letterkundige werken in dicht en proza.

Eenieder die zich Esperanto-literatuur wenscht aan te schaffen kan in dezen catalogus allicht iets van zijn gading vinden.

H. D.

H. J. BULTHUIS: Het eenvoudige leerboek der wereldhulptaal Esperanto. Prijs f 0,50.

2de, omgewerkte en verbeterde druk (3de-6de duizendtal.) Alom verkrijgbaar. Uitgave: VAN DER HAAR & VAN KETEL, den Haag.

Een der Beste Leerboeken.

„Een der beste leerboeken over Esperanto, die wij ooit onder de oogen kregen“. Aldus luidde de conclusie der „Nieuwe Haarlemsche Courant“ over het leerboek in het Esperanto door Majoor J. P. L. NIESTEN.

De prijs van dit volledig leerboek met opgaven en uitwerkingen, bevattende 275 bladzijden is f 1,50.

Esperanto Moerkerk Zegels.

Dit zegel is het meest artistieke onder de vele soorten Esperanto-Sluitzegels die bestaan.

Verkrijgbaar in den Boekhandel
en bij H. DAMEN St. Crispijnstr. 57, 'sBosch.

TOEZENDING FRANCO.

100 ex. f 0.15.

1000 ex. f 1.20

500 ex. f 0.65.

10,000 ex. f 8.—

VEREENIGINGEN GENIETEN KORTING.

ESPERO KATOLIKA.

Internacia monata gazeto.

Honorita per Apostola Beno de Pio X-a, 27-an de Junio 1906.

Oficiala Organo de Internacia Katolika Unuiĝo Esp. (I.K.U.E.)

Redaktoro : D-RO SMULDERS.

Administranto : S-ro F. SLEIJFFERS, Prins Hendrikstr. 93, Den Haag.

**Machinale Fabriek van Houtbewerking
„DE MARK”.**

Jac. van Groenendael, Breda

Alle Timmerwerken, Speciaal in Eikenhout

KERKBANKEN - KERKSTOELEN

SCHOOLMEUBELS, enz.